# *Díaz-Canel dialogis kun altranga gvidanto de Vjetnamio kaj dankis la solidarecon al Kubo.*




Havano, jul 27 (RHK) La unua sekretario de la komunista partio kaj prezidento de la respubliko, Miguel Díaz-Canel, dialogis kun altranga gvidanto vjetnama,   Nguyen Phu Trong.

Per telefona parolado kun la ?enerala sekretario de la komunista partio de Vjetnamio, Díaz-Canel dankis la solidarecon konstantan de tiu azia lando al la kariba insulo.

La insula ?tatestro, skribis mesa?on en Tvitero, dirante ke ili parolis pri la nuna situacio de la kariba lando, kaj denuncis la agreseman kampanjon kontra? Kubo, cele al ?ia malstabiligo organizata de Usono.

La kuba prezidento esprimis sian dankemon kaj sciigis ke amba? flankoj ratifis sian amikecon, kunlaboremon  kaj bonajn rilatojn.

Kubo kaj Vjetnamio celebris pasintjare ses jardekojn de diplomatiaj rilatoj, kiuj restas je la plej alta nivelo jen registare kiel politike.

Fonto:PL

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/265243-diaz-canel-dialogis-kun-altranga-gvidanto-de-vjetnamio-kaj-dankis-la-solidarecon-al-kubo

**Radio Habana Cuba**